

アイヌ語入力プログラムのお話

Rakonto pri komputila programo por enmeti ainlingvajn literojn

北海道新聞の記者が、私にインタビューしました。北海道新聞は日本の北にある北海道で一番大きな新聞です。

Ĵurnalisto de la ĵurnalo Hokkajdo-Ŝinbun intervjuis min. Hokkajdo-Ŝinbun estas la plej granda ĵurnalo en Hokkajdo norde de Japanio.

2016年11月11日（金）の北海道新聞朝刊の文化欄で、それが小さい記事になりました。

En la 11-a de novembro 2016 li faris malgrandan artikolon en la kultura rubriko de la matena eldono de la ĵurnalo.

私の仲間と私は、2003年にアップル社が Mac OS X 10.3 アイヌ語入力プログラムを開発した時に協力しました。その記事は、その話です。

Miaj kamaradoj kaj mi kunlaboris kun la kompanio Apple, kiam la kompanio faris la komputilan programon por enmeti ainlingvajn literojn en Mac OS X 10.3 en la jaro 2003. Pri tio la artikolo temas.

記事の中では、Apple 社へ英文の要望書を出したと書いてます。しかし、これは誤っています。

En la artikolo oni diras, ke ni sendis anglalingvan peton pri tio al la kampanio Apple. Sed tiu priskribo eraras.

実際、アップル社ではなく、ビル&メリンダ・ゲイツ財団に英文の要望書を提出しています。

Fakte, ne al Apple, sed al la fondaĵo Bill & Melinda Gates ni sendis la anglalingvan petleteron.

私は、アイヌ民族の萱野志朗さんに協力をして、ビル&メリンダ・ゲイツ財団に英文の要望書を提出しました。

Mi kunlaboris kun s-ro KAJANO Ŝiroo, mem aino, por sendi anglalingvan peton pri tio al la fondaĵo Bill & Melinda Gates.

ビル&メリンダ・ゲイツ財団がアメリカの先住民族に助成しているという話を、萱野志朗さんが北大の先生から聞きました。

S-ro KAJANO Ŝiroo aŭdis de vicprof. de Hokkajda Universitato, ke la fondaĵo Bill & Melinda Gates helpas Usonajn indiĝenojn.

それで、2008 年に、アイヌ語のテレビを作れないかという要望と Apple で開発してくれたアイヌ語入力プログラムと同様のものが Windows でも作れないかという要望書をビル&メリнда・ゲイツ財団へメールで提出しました。

Tial ni retpoŝte petis en 2008 du aferojn de la fondaĵo Bill & Melinda Gates. La unua estis pri televida programo ainlingva. La dua estis pri procedura programo por enmeti ainlingvajn literojn en Vindozo(Windows) same kiel en Mak(Mac) farita de la kompanio Apple.

私が英語で要望書を作り、アメリカ人の大学教授に直してもらって提出しました。

Mi skribis la petleterojn angle, kaj sendis ilin post korektado de usona universitata profesoro.

しかし、ビル&メリнда・ゲイツ財団からは、これより優先するものがあって、この案件はそれに該当しませんという返事がありました。

Sed la fondaĵo Bill & Melinda Gates respondis, ke la fondaĵo havas pli gravajn aferojn kaj ke nia peto ne estas inter ili.

ご協力はできないが、がんばってくださいで、このお話は終わりです。

Ĝi diris, ke ĝi ne povas helpi al ni, kaj ke ĝi tamen deziras al ni sukceson.

2001 年には、文字コードに関する記事を書いていたフリージャーナリストの小形さんが、私たちを Apple 社の人たちに紹介してくれました。その人たちは、木田さんたちですが、日本語入力プログラム「ことえり」を作っていました。En 2001 la sendependa ĵurnalisto Ogata, kiu skribis artikolojn pri signaro (karaktraro), t.e. komputilaj skribsignaj kodoj inkluzivantaj literajn kodojn, prezentis nin al anoj de la kompanio Apple. Ili estis s-ro Kida kaj liaj kolegoj. Ili faris 'Kotoeri', t.e. la proceduran programon por enmeti japanalingvajjn literojn.

私のアイヌ語教室の先生でもある奥田先生とその大学院生とアイヌ語ペンクラブの大野さん達と一緒にアイヌ語入力プログラムのアドバイスをしました。奥田先生は、著名なアイヌ語研究者です。

Kun prof. Okuda, kiu estas mia instruisto de la aina lingvo, lia postdiploma studento kaj s-ro Oono, kiu estas membro de Ainu-go Pen Kurabu (Ainlingva Pen-Klubo), mi donis al ili konsilojn kiel fari proceduran programon por enmeti ainlingvajjn literojn. Prof. Okuda estas fama studanto de la aina lingvo.

奥田先生が一度 Apple 社に訪問しました。

Prof. Okuda unufoje vizitis la kompanion Apple.

その後、Apple 日本法人と秘密を守るという契約をして、ずいぶん長い間メールのやり取りをしました。

Post tiam ni kontaktis la japanan filion de 'Apple' kaj subskribis interkonsenton pri konfidenceco, kaj longatempe interŝanĝadis retleterojn.

そして、Mac OS X 10.3 でアイヌ語入力プログラムを完成させました。

Kaj ni elfaris la proceduran programon por enmeti ainlingvajn literojn en Mac OS X 10.3.

2012 年に Mac OS X は、OS X に名前が変わりました。OS X 10.8 Mountain Lion です。

En 2012 Mac OS X ŝanĝis sian nomon al OS X , t.e. OS X 10.8 Mountain Lion.

アイヌ語の文字に関するプログラムは、OS X 10.9 までは、ことえりの中にありましたが、OS X 10.10 からはアイヌ語入力が日本語入力から独立してます。La programero pri ainlingvaj literoj ekzistis en 'Kotoeri' ĝis OS X 10.9. Sed ekde OS X 10.10 la programo por ainlingva enmeto de literoj sendependas de tiu por la japanalingva.

Apple 社で売れ筋の iPhone や iPad の基本ソフトは iOS です。この中の「言語選択」という選択枠でアイヌ語を選択できますが、Mac OS X や OS X や macOS 10.12 Sierra と違いアイヌ語入力プログラムはないようです。

'iPhone' kaj 'iPad', kiuj bone vendiĝas inter la produktoj de Apple, enhavas la mastrumilo iOS. Oni povas elekti la ainan lingvon per la elektaĵo "elekto de lingvoj" en la mastrumilo, sed ne trovas la programon por enmeti ainlingvajn literojn kiel en Mac OS X, OS X kaj macOS 10.12 Sierra.

また、2003 年に Mac OS X 10.3 が発表された前の、2000 年にコンピュータで使用される JIS の中の文字コードが新しくなり、アイヌ語の音節末の子音を示す小さなカタカナも採用されました。

En 2000, antaŭ la elfariĝo de Mac OS X 10.3 en 2003, la signaro en JIS (Japana Industria Normo), kiu estis uzata en la komputilo, estis reviziita. En la signaro oni adoptis malgrandajn "japanajn katakana-literojn" por indiki la silabfinajn konsonantojn de la aina lingvo.

1996 年 7 月に日本規格協会は JIS 漢字を広げる計画を公開しました。この時、アイヌ語ペンクラブの稲垣さんという人が、アイヌ語を書くときに使う文字を、新しい規格に加えて欲しいと、委員長である芝野耕司氏に要望しました。

En julio 1996 la Asocio por Japanaj Normoj publikigis planon por pliampleksigi ĉinajn literojn kaj aliajn en JIS. Tiam s-ro Inagaki, membro de Ainlingva Pen-Klubo, postulis, ke s-ro SHIBANO Kooji, la ĉefkomitatano, aldonu la literojn uzendajn por skribi la ainan lingvon.

その要望に前向きに返答し、北海道大学文学部の佐藤知己教授を委員会に招き、アイヌ語で用いられた文字についての説明を受けました。そして 2000 年に新しい JIS 規格ができました。

La komitato respondis pozitive kaj invitis prof-on SATO Tomomi el literatura fakultato de Hokkajda Universitato por aŭskulti lian klarigon pri la literoj uzataj en la aina. Kaj en 2000 oni elfaris novan "JIS".

2002 年に世界共通の文字コードであるユニコードがバージョン 3.2 になり、このユニコードにアイヌ語に用いられた文字も採用されました。

Unikodo(Unicode), la komuna signaro en la mondo, evoluis al versio 3.2 en 2002. En la Unikodo oni adoptis ankaŭ la literojn uzatajn en la aina.

現在は、Windows、Mac とともにアイヌ語用の小さなカタカナを使えるようになりました。

Nun oni povas uzi malgrandajn katakana-literojn por la aina kaj en Vindozo(Windows) kaj en Mak(Mac).

しかし、キーボードを打って、上手に早くアイヌ語ローマ字からカナ入力できるコンピュータは Mac だけです。

Sed Mak(Mac) estas la sola komputilo, en kiu oni povas lerte kaj rapide ŝanĝi ainlingvajjn latinajn literojn en katakana-literojn per klavaro.

Windows では、文字を一つずつ選び、使いづらいものとなっています。

En Vindozo la uzmaniero estas malfacila, ĉar oni devas elekti literojn unuope.

2016 年に、OS X は macOS に名前が変わりましたが、アイヌ語入力は以前と同様です。

En 2016 OS X ŝanĝis sian nomon al macOS, sed la maniero enigi ainlingvajjn literojn restas sama kiel antaŭe.